

KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO - ASOCIO
numero 263 (30) - kvina epoko - aŭgusto 1989



PREMIJOJ

de la 29 aj INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ

SUR PAĜOJ 3a-4a-5a KAJ 6a

PRI TUTMONDA AMIKARO SUR PAĜO 2a.

PRI SESA INTERGRUPA RENKONTIGO SUR
PAĜO 8a.

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
(Enregistrata de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat /Poŝtkesto, 290 - 08200 Sabadell- Catalunya/Katalunio. Telefonnumero (93) 716.3633(ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.) Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1989: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 3200 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: **Prezidanto:** Jordi Carbonell i Pinyol; **Vicprezidanto:** Maria Garcés i Coll; **Ĝenerala Sekretario:** Libert Puig i Gandia; **Kasisto:** Oscar Puig i Cánovas; **Komitatoj:** Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guiñón; **Ĝirona Espero,** Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario)

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3 aj IFL, Olot 1913), Artur DOMÈNECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot 1984), Timothy BRIAN CARR (28aj IFL, Barcelona 1988)

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol-Avda. del Paral.lel, 96-6è-Tel. 329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: **Centre d'Esperanto Sabadell,** Apartat, 407, Papa Pius XI, 130-tl.(93) 716.3633, 08200 Sabadell; **Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto Grupo,** St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); **Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto - Grupo,** St. Josep, 20- 08922 Sta. Coloma de Gramenet (Barcelonès); **Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto,** Mallorca, 207 - pral. tel. (93) 253.9507, 08036 Barcelona; **Esperanto - Centro Tarragona,** Apartat 1236- 43080 Tarragona; **Esperanto-Fako "S.C. Joventut Terrassenca",** St. Francesc, 52 08221 Terrassa; **Esperanto Grupo "Jozefo Anglès",** Apartat, 336-08190 Sant Cugat del Vallès; **Firma Tero Esperanto - Fako Centre Comarcal Lleidatà,** Gran Via, 592 08007 Barcelona; **Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal,** Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau d'Ordal; **Ĝirona Espero,** Apartat, 509 -17080 Girona, **Hispana Esperanto - Fervojista Asocio ĉe Stacidomo Sants- Barcelona;** **Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada,** Baixada de Sant Nicolau, 21 08700 Igualada.
Dipòsit Legal : B- 27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. 725.5091 Sabadell.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893. 7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar. Ctra. de la Canya, s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero, Apartat, 509 - 17080 Girona (Gironès)

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep Ma. Serrano, Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau) tel. (977) 218941 - 43007 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre, Montsià: Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel. (973) 442009 - 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears: Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830 07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord: Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000 Perpinyà (Rosselló)

TUTMONDA AMIKARO

Jen la ĝenerala, verŝajne provizora nomo, de la ideo de Paul Tournon el Nîmes pri la kreo de regiona agado, kiun la proksimeco mem invitas, principe je eŭropa nivelo. Li proponas 11 agadregionojn laŭ la bildo kaj alvokas debati la proponon dum la 24a Kataluna Kongreso de Esperanto en Perpinyà kaj krei la Nordokcidentan Mediteranean Amikaron se estiĝas konsento.

Konstanta kaj reciproka interŝanĝo de dokumentoj inter la esperantistoj de la koncerna regiono, fariĝos la bazo de pli ofta interkunlaboro kaj garantios la sukceson de ĉiuj aranĝoj en la regiono kaj la efektiviĝon de konstanta praktikado de la lingvo.

EŬROPAJ REGIONOJ EN TUTMONDA AMIKARO



- 11 REGIONOJ
- | | | | |
|------|----------------------------|------|---------------------|
| SOKA | Sud Okcidenta Atlantiko | NE | Norda Eŭropo |
| OKA | Okcidenta Atlantiko | NORE | Nord Orienta Eŭropo |
| NOKM | Nord Okcidenta Mediteraneo | ORE | Orienta Eŭropo |
| OKE | Okcidenta Eŭropo | AE | Adriatika Eŭropo |
| NOKE | Nord Okcidenta Eŭropo | SE | Suda Eŭropo |
| CE | Centra Eŭropo | | |



PREMIOJ

de la 29 aj INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ

MODULOJ

rozo
clelia conterno



Hodiaŭ faŭkis inter ni distancoj
Ĉar via voĉo preskaŭ ne aŭdiĝis
Malantaŭ telefonaj disonancoj.
Leterojn viajn prenis mi espere,
Sed kontraŭ via manko ne sufiĉis
Relegi amajn vortojn jam parkere
Konatajn. Rampis tag' en apati' ĝis
Sin trudis tra l' fenestro sunsubiro,
Per ruĝa flagosvingo plej severe
Signalis, ke ne licas ĉi sopiro.

Soleca nokto vindas min funebre,
L' aŭroron ombre dampas la purpuro
De neebleco. Miaj lipoj febre
Vian nomon ekformas. Mute vokas
Animo al animo. Vi, karulo,
Sencigas la ekziston; vi apogas
Konsile kaj konsole. Tamen ŝnuro
De devoj kaj promesoj min alligas;
Alia mian vivon jam arogas,
Kaj la pase' futuron enĉenigas.

Ne serĉus ni nirvanojn malaŭtentajn;
El vivrutina grizo forĝus kune
Irizajn tagojn, noktojn stelarĝentajn,
Kaj verdus en senfina primavero,
Sub kies varmo florus ni imune
Defiaj kontraŭ frostoj de despero.
Jes, vivi vivon ĝoje kaj subsune
Kun vi ne estus nur aspiro blinda
De dupo ensorĉita de ĥimero...
...Se estus mi antaŭe jam sciinta!

Sed tiel eĉ, apartaj, ni kunardos
En la krisolo de l' ekstaz' iama,
Kaj frida blanko de l' disiĝo hardos
Nin du en necedeman amoŝtalon,
Por ke la fideleco porĉiama
Ne timu rustigantan koramaron.
Ne estis mia vivo vante vana
Se vin al mi ĝi donis, eĉ momente.
Do spitas mi ĉi mornan aktualon
Por ami vin konstante kaj senpente.



AKUŜOJ eglanterio

Mi naskis mian bebon en iom da doloro,
Sed min ĉirkaŭis: dume vizaĝoj ridetantaj,
Por helpi kuraĝige per vortoj de konsolo
Ĝis lulis mi enbrake kun sentoj korofandaj
La streĉe atenditan rezulton de l' laboro.
Mi estis ĉi-momente hero' de agoj grandaj,
Akceptis la gratulojn, ripozis en la gloro,
Revante pri l' promeso de tagoj plenumantaj.
Kaj eĉ se la realo ĉi revon jam disŝiras
Kaj velkas ĉiuj celoj, al kiuj mi aspiras,
Infano tamen estas ja pli ol tiu semo,
El kiu ĝi elkreskis. Mi estas do fiera,
Ĉar mia filineto fariĝos pli libera
Ol mi por lukti kontraŭ la ĉenoj de l' sistemo.

Mi naskas miajn versojn en iom da doloro,
Kaj min ĉirkaŭas dume fantomoj rikanantaj,
Sed helpo venas sole el tro da alkoholo.
Rigardas mi konfuzon de kelkaj vortoj vantaj,
Rezulton de luktado dum horoj da izolo,
Kaj miaj pensoflugoj montriĝas nur brokantaj
Ŝablonoj de ridinde fuŝema amatoro,
Kiun la Muzo mokas per flustroj enkaptantaj.
Prikanti tiun veron, kiun la mond' sopiras;
Per flamaj vortoj sproni: jen tio min inspiras.
Sed mia kanto estas malpli ol tiu semo,
El kiu ĝi ekestis; kreskaĵo degenera
Kun flava foliaro kaj floro efemera,
Ĉar nutris ĝin la sablo de mia magra memo.

ANTAŬ LA MADONO

violo

Meditas vi milde en hela sereno,
La bebo ensine kvietas
Kaj via beata mieno
Mensoge ridetas,
Por viajn fratinojn perfidi.
Permesu min ridi,

Ĉar viaj okuloj ne montras
La nubojn de noktoj maldormaj
Kaj tagoj senformaj.
Sed tion patrinoj alfrontas
Kaj celojn perdotajn en strebo servuta,
Dum restas vi muta.

Madono! Ĉu sentis vi iam,
Ke sango kaj karno dezire vulkanas,
Kaj volis rifuzi obeon tro pian?
Jen vi, venkintino, tiranas,
Al trono de l' luno pretendas
Kaj ni, Magdalenoj, punendas:

En ĉasto neeblo vi naskis Diidon,
Kaj nun ni virinoj nur peki kapablas.
Dum viroj senĝene mastradon establas,
Al ni vi forrabas dignecon, memfidon.
Do kie la povo pra-mita?
Por ĉiam perdita?

Plej ardaj kultantoj en nigro mantelu,
Neigu sin mem kaj forcedu la mondon;
Sed mi... mi ribelu
Kaj serĉu envive pli taŭgan respondon!
Maria, el vi ne plu lumas inspiroj;
Ĉar Dion kaj vin ambaŭ kreis nur viroj.



SENMORTECO

Honora Mencio je EGLANTERIO

Vi skuis min el mensa torporo
Kaj diskarnis mian memon
en mil puzlerojn.
Mi vidis la noktojn,
suĉitajn silente de l' tempo,
resurekti fenikse,
kvazaŭfulme raketi,
l' universon trasparki,
leontode tutflori,
diamante kaskadi
en piroteknika lumesko.
L' astataj homoj surteraj,
premitaj de l' vespera flugilo,
halucine ruliĝis Eakon.
Sed la nokton disvenkas
kiu vivas de lumo,
do nure por mi
la tenebra kurteno
ekŝaltis la ĉielon:
kiel unusola kometo
miriadoj da steloj
montris la vojon naosan
dum Bach-a kantato
sigele akompanis mian animon
ĝis la mita altaro
de l' ĉiesa dio Senmorteco.



STRATA KANTO

Honora Mencio je "JAUME GRAU I CASAS"

Kiam plenaĝos mi,
ne estos kiel paĉjo:
tedita kaj sen fid'
fivort' aŭ ridegado;
brutiga laboraĉ'
futbalo redimanĉe,
kartlud' ĉe la drinkej'
tabak' je ok pesetoj;
kretena televid'
dronigas la parolon;
kaj ban' en naŭza mar'
se venas la ferioj.
Patrin' , laboremul' :
la hal' kaj hejmpurigo;
kaj mia juna frat'
lernejo misinstrua.
Kia sencel' ! Ve, ja
nur eble vere vivas
mortantoj en batal'
sur strat' aŭ en milito.

Estrar' , apostolar' ,
dissemu l' alarmkrion !
Prolet' kaj sciencist' ,
perfortu l' maŝinaron!
Geni' de ĉiu art'
beligu l' krucmiliton!
Kreskinto kaj infan'
de ĉiu ras' aŭ lingvo.
venkit' kaj mizerul' ,
amas' nekalkulebla,
esperu jam sen tim'
la klamon fratigantan.
Ankoraŭ restas temp' !
Ankor' , ancor' , ankoraŭ !
Pereos ĉi fimond'
stultega kaj senkora.
De pli alloga viv' ,
ni fosu fundamenton !

Joan Oliver

ĜENEVO: ESPERANTO EN LA FOIRO "MONDOLINGUA"

Samtempe kiel la *Salon du Livre* (Librofoiro) kaj kunlige al ĝi okazis en Ĝenevo de la 26-a ĝis la 30-a de aprilo 1989 foiro dediĉita al lingvoj kun la titolo *Mondolingua, le Salon des Langues et des Cultures* (Foiro pri Lingvoj kaj Kulturoj).

Svisa Esperanto-Societo kaj Kultura Centro Esperantista tie aranĝis elmontron de libroj, revuoj kaj kasedoj, plus, kompreneble, disdonon de informmaterialo al la vizitantoj. Respondecis pri la afero Claude Piron, kiu ĉeestis dum la tuta daŭro de la foiro. Lin helpis dekduo da esperantistoj, el kiuj plej longe Ueli Haenni, Dietrich Weidmann kaj Erika Eichholzer. La budon surloke pretigis profesia dekoraciistino s-ino Strahm, kune kun Nicole kaj Claude Piron.

La budo okupis ses kvadratajn metrojn (2 x 3 m). Sur unu el la muroj altiris la rigardon la slogano *L'espéranto: une autre idée de la communication. L'espéranto: une haute idée de la communication.* (Esperanto: alia ideo pri komunikado. Esperanto: alta ideo pri komunikado). Sub ĝi troviĝis breto kun du *Tiŝĉoj*, *Asterikso*, *La Eta Princo* kaj diversaj infanlibroj, kaj sube aliaj bretoj kun verkoj ĉefe literaturaj, inkluzive de dulingva sonetaro ŝekspira kaj de la *Esperanta Antologio*, kiu impresis multajn vizitantojn. Ankaŭ la *Korano* tie elstaris. Sur la alia, dekstra murduono belega kolorfoto de unu el la KCE-domoj pendis, kun teksto klariga. Sur la vid-al-vida muro troviĝis la alia slogano: *L'espéranto: le meilleur tremplin pour l'étude des langues* (Esperanto: la plej bona saltotabulo por lingvostudado) kaj sub ĝi lerniloj, vortaroj kaj libroj diversaj.

Fonmure okulfrapis mapo de Japanio, sur kiu kolorpingloj videbligis la lokojn, kie UEA-delegito troviĝas. Franclingva klarigo konigis la signifon de tiu mapo, kiu montriĝis konstanta kaŭzo de miro: «*Rigardu! Eĉ en Japanio oni parolas esperanton!*» Tablo ĉe-koridora ebligis al la vizitantoj laŭvole preni informfoliojn. Apud ĝi, dosiero kun specimenoj de ordinara, scienca, ĵurnalista, poezia esperanto kaj kun diversaj indikoj pri la maniero, laŭ kiu la lingvo funkcias (vortfarado, ktp) estis foliumebla kaj ofte foliumata.

La foiro estis grandkyante vizitata: pli ol 14.000 eniroj registriĝis. Multegaj personoj do pasis preter la esperanto-budo. Sed antaŭ ol preterpasi, multaj haltis, foliumis la librojn kaj la ceterajn dokumentojn, skribis sian nomon sur la orlibro kun peto pri informoj, enmanigis du aŭ tri el la informfolioj, aliĝis al la koresponda kurso de KCE aŭ anoncis sian intencion partopreni en la kurso, kiun ek de oktobro Claude Piron gvidos en Ĝenevo kadre de *Cours industriels du soir* (Indutriaj Vesperkursoj). Jam 43 personoj sciigis sian deziron sekvi tiun kurson; verŝajne tiu nombro malaltiĝos antaŭ la kurskomenco; alie, seriozaj organizproblemoj stariĝos.

Kelkaj grumbluloj manifestis sian nekontenton aŭ ironie sarkasme pri esperanto, sed ili estis tre malmultaj. La sinteno de la granda plimulto estis scivola, mira kaj favora. Se iu petis detalojn pri la funkciado de la lingvo kaj unu el la buduloj komencis klarigi, tuj formiĝis aro da aŭskultantoj, kiu kelkfoje eĉ ŝtopis la koridoron.

Komputilo kun la programo *Esparol*, kiu prononcas esperante, kion oni tajpas - ĝin ĝenerale prizorgis juna Marion Grosjean - funkciis dum la tuta foiro. Pluraj lingvoinstruistoj interesiĝis pri tiu parolanta maŝino.

Libroj ne estis vendataj ĉe la budo, sed vizitantoj povis ilin mendi. Trideko da mendoj tiel registriĝis (tio estas malmulta, sed oni ne forgesu, ke nur malmultaj verkoj estis ekspoziciataj, kaj ke por la granda plimulto, estis la unua renkonto kun esperanto).

La esperanto-budo elstaris, ĉar preskaŭ ĉiuj aliaj ekspoziciantoj proponis nur kursojn de angla lingvo en iu anglalingva lando. Ili ne elmontris materialon kaj do aspektis senreliefe. La efiko de la bele koloraj librokovriloj esperantaj al tio ege kontrastis. Pluraj personoj gratulis pri la beleco de la budo. Krome, estis budo, kie io diskutebilis.




SESA INTERGRUPA RENKONTIĜO

Ni memorigas la membrojn de nia Asocio pri nia venonta Intergrupa Renkontiĝo okazonta en Sant Pau d'Ordal la 7an kaj 8an de oktobro.

Jen la provizora programo: Dum la sabata vespero la gejunuloj kunvenos, vespermanĝos kaj tranoktos kune. Dimanĉe okazos vizito de la Esperanto-Muzeo, debato pri aktuala temo, komuna tagmanĝo kaj eventuala distra posttagmezo. Dum septembro ni informos la Grupojn per speciala cirkulerletero pri plej konkreta programo. Tamen ĉiuj povas rekte informiĝi ĉe nia sekretariĉjo de post la 18a de septembro ĉiutage ekde lundo ĝis vendredo, inter 20a kaj 22a h.

KRUCVORTENIGMO N-RO 3 de Pere M. Martin i Burutxaga



DEK DU ESPERANTAJ VERKISTOJ

HORIZONTALALE:

1. VERKISTO (8). Kolektive (3)
2. Vokalo (1). Pasiva sufikso preterita (2). (inverse) VERKISTINO (6)
3. VERKISTO (8). Titano (2)
4. Aluminio (2). Reĝo el teatraĵo (3). Du konsonantoj malsamaj (2). Interjekcio (2)
5. Prepozicio (5). (inverse) El ia tempo (4)
6. Vaska partio (2). Bildokarto (2). Kataluna korpo (3). Du konsonantoj malsamaj (2)
7. (inverse) Usona verkisto (3). Latina adjektivo kaj pronomo (3). Oksigeno (1)
8. Pronomo (2). Parenceca prefikso (2). Ago de obei (4)

9. (inverse) VERKISTO (7,4)
10. Malgrand' (2). (inverse) Grandega arteri' (6). Prepozicio (2)
11. (inverse) Usona ŝtato (4). Rapide iri (4)
12. Prepozicio (2). Preni kiel rimedon, instrumenton, por atingi celon (3). (inverse) Dolaro (3)

VERTIKALE:

1. VERKISTINO (4,5).
2. Komparativa konjunkcio (2). VERKISTINO (7)
3. Prefikso (3). Aŭtomobilaj simboloj: Tajlando, Portugalio, Urugvajo, Italio (1,1,1,1)
4. (inverse) Per la brusto (6). VERKISTO (5)
5. Nitrogeno (1). (inverse) VERKISTO (4). Oksigeno (1). Du vokaloj malsamaj (2)
6. Aŭtomobila simbolo: Hungario (1). Pezmezurunu' (3). Du konsonantoj malsamaj (2). Verba finaĵo (1)
7. Verba sufikso futura (3). VERKISTO (8)
8. Supernatura fantazia estaĵ' (4). Du vokaloj egalaj (2). Nedifina pronomo (2)
9. Sulfuro (1). (inverse) VERKISTO (8)
10. (inverse) Nealkohola trinkaĵo (3). Prepozicio (2). Individu' (2)
11. VERKISTO (6). Alkoholtrinkaĵo (5)
12. (inverse) Prepozicio (2). (inverse) VERKISTO (9)

Partoprenu en nia tria enigmo kaj sendu viajn solvojn ĝis la 30a de septembro 1989a.